

P. Alberto Maggi OSM

“Mi estis fremdulo... la aliulo en la evangelioj”

*Kadre de la renkontiĝo*

*LA RELIGIOJ INTERPAROLAS POR PACA MONDO*

*Komparo inter malsamaj vidpunktoj pri la homaro en la pluretna  
socimedia.*

Promensalono de la Muzoj (Ankono- Italio)  
6an de oktobro 2010

transskribo de surbendigo [ne reviziita de la aŭtoro](#)

Noto: la transskribo estas laŭvorta, la komposteraroj ŝuldiĝas al la malsameco inter la skriba lingvo kaj la parola lingvo kaj la interpunkcio estas metita laŭ aŭskultado.

Bonan vesperon. Dankon pro la invito, dankon pro la akcepto, dankon al Vi ĉiuj kiuj estas ĉi tie. Ni tuj klarigu ke la prelego kiun mi faros, eĉ se, kiel Vi vidis, devis temi pri la Evangelioj, tamen ĝi transiras la religian celon, ĉar ĝi estas parolado de Jesuo, ĝi estas prelego kiu rilatas la homaron, pro tio, kion nun ni diros jes ja certe estas eltirita el la Evangelioj, sed ĝi sin turnas al la tuta homaro, do kaj al kredantoj aŭ al la ne kredantoj kaj al la kredantoj je aliaj religioj ol la nia.

La temon jam vi konas, temas pri la fremdulo. Kiu estas la fremdulo? Ekde ĉiam en ĉiuj kulturoj la fremdulo timigis. Vi scias ke en multaj antikvaj lingvoj la vortoj fremdulo kaj malamiko samas inter si; aŭ ke la vortoj fremdulino kaj publikulino estas samaj, do la fremdulo ĉiam timigis. Kial ĝi timigis? Ĉar ĝi nin konsternas, ĉar temas pri homo kiu ne parolas nian lingvon, kaj ni evidente taksas nian lingvon kiel tiun justan; li ne havas nian kulturon kaj ni taksas ke la nia estas la taŭga kulturo; li ne sin vestas kiel ni, li ne havas nian kredon, eĉ li ne manĝas niajn samajn pladojn kaj, do, li krizigas niajn certecojn.

Tiam, kiel mi diris la diskuto kiun ni nun komencas pri la fremdulo ne rilatas nur kiun ni celas kiel fremdulon, nome, iu kiu devenas el eksterlando, sed atentu, ĉar la fremduloj eble la plej malfacile akcepteblaj estas tiuj kiujn ni havas en nia hejmo.

Se ni opinias ke la fremdulo estas iu kiu ne sin vestas kiel ni, ne parolas kiel ni, havas malsamajn kutimojn ol la niaj, vidu ke tuj eksaltas kies portreto? Tiu de la gefiloj. Kiuj estas la gefiloj? La gefiloj parolas lingvaĵon kiu tute ne estas tiu de la gepatroj; ili tute ne sin vestas kiel la gepatroj, ili havas siajn manierojn kaj kulturon; eĉ ilia maniero manĝi estas malsama ol tiu de la gepatroj. Kaj, do, la unua fremdulo kiun ni devas alfronti povas esti ĝuste la filo, tiam, nu, ni plilargigu nian diskuton pri la fremduloj. Ili ne estas nur tiuj kiuj alvenas el eksterlando, sed ili estas ĉiuj kiuj kelkmaniere estas “malsamaj” al ni kaj pro tio ili nin konsternas.

La novaĵo kiun Jesuo alportis en tia sfero estis tiom granda ke necesis jardekoj al la Eklezio por komenci ĝin ĝermigi kaj ankoraŭ tion ne finiĝis, ekzistas ankoraŭ tro da fremduloj en la medio kaj interne de la Eklezio, homoj kiu ankoraŭ ne estas akceptitaj. Do, la novaĵo alportita de Jesuo devas ankoraŭ burĝoni en sia pleno, sed la ĝermoj jam ekzistas.

Tiam, ĉi-vespere ni kolektas kelkajn el tiaj burĝonoj kaj tion ni faras ekante de la persono de la unua ulo kiu sukcesis ion kompreni pri la mesaĝo de Jesuo. Ankaŭ al li necesis dekoj da jaroj, sed poste li formulis la mesaĝon de Jesuo en klara kaj decida maniero, kiu devus esti stampita en nia koro kaj en nia

menso, kaj ĝi devus esti ĉizita antaŭ la pordegoj de ĉiuj preĝejoj. Kiu estas tiu homo?

Li estas Sankta Petro.

Sankta Petro havis malfacilaĵojn sin malfermi al la fremduloj same kiel ĉiuj kristanaj komunumoj. Kial? Ĉar li estis alkiutimiĝinta al centjara religia tradicio laŭ kiu oni asertis ke la fremduloj devas esti regataj, kaj ke ili ne havas la rajton esti traktataj kiel homoj – kiel “fremduloj” oni celis ankaŭ la paganojn. La hebreoj atendis la regnon de Izraelo, regno kiu devis superregi ĉiujn aliajn popolojn, kaj klopodi akcepti kaj kompreni la novaĵon alportita de Jesuo pro kiu ne plu ekzistas la fremdulo, sed ekzistas nur homoj, estis malfacile al li, kiel estis malfacile por la Eklezio.

Ĉiukaze Petro komencas sian transforman proceson, en la Agoj de la Apostoloj ĝi komenciĝas ĉe la 9a ĉapitro, kiam li faras ion neantaŭvideblan por hebreo: li iras loĝi en kies domo? Li iras loĝi ĉe tanisto, nome ĉe iu kiu faras malpuran laboron.

Nu, al la Sankta Spirito sufiĉas la plej eta fendo en la kreaĵo rilate la observadon de la Leĝo por trovi al si lokon. Kaj kio okazas? Okazas ke intertempe estis iu romia centestro nomata Kornelio, kiu ricevas, inspire, iri aŭ sendi homojn ĉe Petron por ke ili estu akceptataj.

Kaj la verkinto de la Agoj de la Apostoloj, en la 10a ĉapitro, skribas ke kiam ili vojaĝis kaj alproksimiĝis al la urbo, Petro supreniris sur la tegmenton, por preĝi, La religiaj kutimoj, kiam ili enradikiĝas en la homoj, malfacile estas elradikigeblaj. Kiel do, vi iras sur la tegmenton por preĝi! Ĉu Jesuo ne diris ke kiam vi bezonas preĝi vi iru en la plej kaŝitan lokon, tiel ke neniu vin vidu, ĉar la preĝo ne devas esti elmontrita? Kien iras Petro? Li iras en la plej videblan lokon de la domo. Vi scias la domoj estas plataj, la tegmento estas plata. Tie li sin metas por preĝi.

Nu, la evangeliisto rimarkas ke estis cirkaŭ la sesa horo, la horo de la morto de Jesuo. Tiam nun Sankta Luko montras al ni kiaj estas la efikoj de la Jesua morto. Kaj, dum li preĝis li havis kvazaŭ vizion. Li diras: “Li vidis la ĉielon malfermitan”- tio signifas la dian komunikadon- kaj ian ujon malsuprenirantan, kvazaŭ grandan tukon, mallevatan per la kvar anguloj sur la teron – kvar estas la nombro kiu indikas la kardinalajn punktojn – bone, en tiu ĉi tuko troviĝis ĉiaj kvar piedaj bestoj kaj rampaĵoj de la tero kaj birdoj de la ĉielo. Nome en tiu ĉi tuko vidigas la tutan kreon laŭ la ordo kiun ni trovas en la libro Genezo. Kaj venis voĉo al li: kiu diris: “Leviĝu, Petro; buĉu kaj manĝu” Estas la voĉo de Jesuo kiu petas lin manĝi, kaj kia estas la respondo de Petro? Kaj vidu, nun ni pritraktas la temon de la pureco kaj malpureco el

vidpunkto de la manĝaĵo. La fakto estas ke tiu ĉi estis la ŝlosilo, la kerno por sin malfermi al nova vidpunkto kie ne ekzistas puraj homoj aŭ malpuraj homoj. Kion respondas Petro? “Ho ne, Sinjoro, ĉar mi neniam manĝis ion profanan aŭ malpuran”.

En la libro “Levidoj”, kontraŭdirante tion kio estas skribita en la libro “Genezo”, kie oni priparolas la kreon dirante ke estas Dio kiu ĉion kreis, oni komencas disdividi purajn bestojn, kiuj estas manĝeblaj, disde la malpuraj kiuj estas ne manĝeblaj. Malpura signifas ke io estas malebligita kontakti la Sinjoron. Kaj, do, Petro rifuzas la manĝaĵojn.

Tiam la duan fojon denove atingas lin voĉo: “Kion Dio purigis, tion vi ne nomu profana”. Petro kaj la tiama kristana komunumo ankoraŭ ne komprenis la instruadon de Jesuo pro kiu kio igas vin malpura ne estas kio eniras en vin, ne estas la proksimeco al io kiu troviĝas ekster vi, sed estas kio eliras el vi kiu vin malpurigas. Nu, la vizio ripetiĝas trifoje kaj la kompatinda Petro ekde kiam la koko kantis, je la nombro tri li komencas timi, kaj do la trian fojon li komprenas.

Kaj ĝuste en tiu momento, dum Petro pripensadis la vizion, la Sankta Spirito diris al li: “Jen tri viroj vin serĉas. Sed leviĝu, kaj malsupreniru, kaj vojaĝu kun ili, tute ne hezitante; ĉar mi ilin sendis”.

Tio kion skribas Sankta Luko estas io eksterordinara. La Spirito kiam Petro ĉesis kontraŭmeti reziston al la voĉo de Jesuo, jen ĝi profitas je tiu ĉi minimuma fendo por lin helpi sin liberigi de siaj antaŭjuĝoj, kiuj, mi tion rediras, ne estas manĝaj; ili estas ekzistadaj antaŭjuĝoj en medio kie oni disdividis purajn homojn disde la malpuraj. Do, la Sankta Spirito pacience atendas la momenton kiam Petro malstreĉas la atenton kaj profitas je tio, kaj kion Li diras? “ĉar mi ilin sendis”.

Kion diras Sankta Luko estas io eksterordinara. Ne estis Kornelio la romia, pagana centrestro kiu sendis siajn kurierojn al Petro sed estis la Sankta Spirito. Kornelio, la pagano estis aganta puŝite de la Sankta Spirito, kiel vera profeto. Kion la Evangeliisto estas diranta al ni estas sensacia: por konverti kristanon la Sankta Spirito uzis fremdulon, paganon. La Sankta Spirito trovante reziston ĉe Petro serĉis la vojon de la paganoj.

La okazintaĵo estas tiel sensacia ke poste, kiam Petro estos vokata al Jeruzalemo de la Ekleziaj ĉefoj por senkulpigi sin pro tiu grava malobeco sin miksi kun paganoj, kun fremduloj, la kompatinda Petro klopodos senkulpigi sin ĉiun respondecon atribuante al la Sankta Spirito, kaj li tute evitis diri ke estis Kornelio la centestro. Li diras: “tiu viro” - kiu scias kiu li estis- tiu viro kiu venis serĉi min”.

Kaj, ĉiukaze, post tiu ĉi sperto dum li parolas al paganoj, al fremduloj kiuj iris ĉe lin, jen kion diras Petro: “Vi mem scias, kiel kontraŭleĝe estas por Judo kamaradiĝi aŭ aliri al alinaciano”. Jen estas la religio kiu incitas la rasismon, estas la religio kiu disdividas la homoj unuj de la aliaj, ĉar ĉiu religio pretendas esti la vera, esti la ununura, kaj, do, ĉiuj aliaj estas malveraj. Ĉiu religio pretendas komuniki la senton de supereco al la homoj. Kaj jen Petro kiu tiam agnoskas: “kontraŭleĝe estas por Judo kamaradiĝi aŭ aliri al alinaciano”. Ekzistas disdivido je la nomo de Dio kaj kiam la ideoj enradikiĝas en la nomo de Dio estos malfacile ilin elradikigi, sed: kaj jen, finfine la novaĵo alportita de Jesuo, kiun ni nun vidos, ĝi komencas burĝoni, eĉ se ĝi ankoraŭ ne komplete floris. Kion diras Petro? “Sed Dio min admonis, ke mi ne nomu ian homon profana aŭ malpura”.

Estas la fino de la religio. La religio baziĝas sur la disdivido inter puraj homoj kaj pekuloj, inter puraĵo kaj malpuraĵo, inter pekulo kaj justulo, inter merituloj kaj malmerituloj. Petro post tiu ĉi sperto diras: “Dio min admonis, ke mi ne nomu ian homon profana aŭ malpura”. La disdivido de la bestoj puraj kaj malpuraj kaj la disdivido inter la homoj ne devenis de Dio. Tiu ĉi disdivido tiom ŝatata de ĉiuj religioj inter la sanktaĵoj kaj la malsanktaĵoj, inter kredantoj kaj nekredantoj, inter sanktuloj kaj pekuloj ne devenas de Dio. Do, Dio montris al mi ke ne ekzistas homo kiu povu esti konsiderata kiel malpura.

El tiu ĉi sperto de Sankta Petro ekfermentas en la Eklezio granda malfermiteco kiu estos eldirita de Sankta Paŭlo en du tekstoj, unu troviĝas en la Letero al Koloseanoj kaj la alia troviĝas en la Letero al Galatoj, unu pli bela ol la alia pro la malfermiteco. En la Letero al Korintanoj Sankta Paŭlo diras: “Tie ne povas esti Greko kaj Judo, cirkumcido kaj necirkumcido, barbaro, Skito, sklavo, liberulo, sed Kristo estas ĉio kaj en ĉio”.

Ne plu ekzistas tiu disdivido, fremdulo kaj ne fremdulo sed, en la letero al Galatoj, li diras: “Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja”- kaj ĉi tie Sankta Paŭlo diras gravajon. En la libro Genezo oni legas ke Dio dum la kreo “en formo de viro kaj virino Li kreis ilin”. Kion atingas diri Sankta Paŭlo uzante la samajn vortojn? “ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo”. Do, komenciĝas tiu granda malfermiteco kie ĉiuj tiuj disdividoj kiuj troviĝis en la medio, la fremdulo, la viro, la puraĵo kaj la malpuraĵo falas unu post la alia.

Sed el kie naskiĝas tiuj eldiroj de Sankta Petro kaj poste de Sankta Paŭlo? Ni trovas ilin en la Evangelioj kie ili ekfermentis, kaj ni prikonsideru nur kelkajn erojn dum la tempo kiu restas al ni, ekzemple el la Evangelio laŭ Sankta Mateo.

En la Evangelio laŭ Sankta Mateo, en la geneologio de Jesuo, surprize, le Evangeliiisto enmetas kvar virinojn, kaj la virinoj neniam estas konsiderataj en la geneologioj, sed ĉi tie temas eĉ pri fremdaj virinoj. Do, inter la praavinoj de Jesuo estas kanaanaj homoj, estas Moabidoj (popolo naskiĝinta el sangadulto), estas hititaj homoj. Do Jesuo estas la frukto de la tuta ĉi tiea miksaĵo da rasoj kaj la antaŭsciigo de tiu kiu poste estos la anonco de Jesuo okazas en epizodo kiu estis tiom tikla, tiom ĝena, tiom neeltenebla por la praa Eklezio ke oni ĝin tiom mildigis ĝis ĝin ŝanĝi en rakonteton taŭgan por aranĝi kripon, sed ne kiel profunda teologia beleco. Mi referencas al la epizodo de la tri magoj.

Vi ja konas la 2an ĉapitron de la Evangelio laŭ Sankta Mateo: “Kiam Jesuo estis naskita en Bet-Leĥem de Judujo en la tempo de la reĝo Herodo” – kaj la evangeliisto, sciante ke li estas dironta ion sensacian, ion bruan, tuj li uzas dirmanieron kiu indikas surprizon dirante: Kaj jen alvenis iuj magoj el Oriento al Jeruzalemo”<sup>1</sup> La surprizo estas alportita de la alveno de la magoj. La greka termino estas μάγοι, sorĉistoj, kiu tamen malagrabla kontrastis kun la disciplino de la origina kristana komunumo, ĝi kontrastis kun la tiuepokaj kredoj. Kiuj estas tiuj ĉi magoj, la greka vorto de la tempo de Sankta Mateo indikas la trompistojn, rakontistojn, ĉarlatanojn. En la Malnova Testamento ili aperas nur unu fojon en la Libro Daniel kunigitaj kun la aŭguristoj, kun la sorĉistoj.

Iukaze en la juda Religio la magoj estas personoj duoble malpuraj, ili estas malpuraj ĉar ili estas paganoj kaj ĉar ili praktikas agon kiun la Biblio kondamnas.<sup>2</sup> En la Talmudo estas skribite: “Kiu lernas ion de mago, tiu meritas la mortopunon”. Kaj ankaŭ en la Nova Testamento la vorto mago ĉiam havas negativan nuancon, kaj en la unua Katekismo de la Kristana Eklezio, kiu nomiĝas “Didakeo”, estas malpermesite praktiki la arton de mago, kiu estas metita inter la malpermeso ŝteli kaj tiu pri abortigo.

Nu, la evangeliisto ne sin lasas influi de tiuj ĉi religiaj juĝoj kaj li konsideras la magojn kiel la unuajn kiuj konscias pri la savo kiun Dio oferdonas al la tuta homaro, ĝuste tiujn kiujn la religio konsideras kiel ekskluditajn el la savo ĉar ili estas fremduloj, paganoj kaj ĉar ili sin dediĉas al ago malpermesata de la Biblio. Tiu ĉi epizodo estis tiom neeltenebla ke en la Eklezio mem oni daŭrigis procedon de mildigo rilate ĝin. Antaŭ ĉio, en la itala lingvo, tiun ĉi malsimpatian vorton “Magoj” oni ŝanĝis al la pli sendanĝera kaj banala vorto “*Magi*” [elparolu: Maĝi].

Kiuj estas la *Maĝi*? Oni ne scias kiuj ili estas. Kies pluralo estas la vorto *Maĝi*? Ĉu de “*Magio*” [elparolu Maĝo]? Se la singulara vorto estas *Mago*, la pluralo

<sup>1</sup> En la esperanta Biblio la magoj estas nomataj saĝuloj sed ĉi tie oni devas uzi la vorton magoj por pli bone komprenigi la tekston.

<sup>2</sup> En esperanto, la vorto mago indikas la pastrojn de la hitita religio.

devas esti *Maghi* [elparolu Magi]. Do oni faris el ili *Maĝoj* kaj poste – entute homoj praktikantaj astronomion aŭ eĉ ĉarlatanoj, kiel tio eblas? Tiam oni klopodis nobeligi ilin. Ili fariĝis Reĝoj; surbaze de la nombro de iliaj donacoj ili fariĝis tri kaj poste oni eĉ serĉis taŭgajn nomojn por tiuj ĉi roluloj kaj la pupoj de la kripo jen ili jam estis pretaj.

Sed, vere, tiu ĉi paĝo transiras la folkloron. Kial? Ĉar temas pri tre malfermita epizodo, kie la evangeliisto ne celas rakonti epizodon por kroniko sed precipe li celas la universalan malfermitecon de Jesuo, kiu estos la universala amo de Dio por kiu ne ekzistas elektitaj popoloj kaj malsuperaj popoloj. Ekzistas neniu nacio kiu povu esti konsiderata kiel plejamata de Dio. Vi scias ke ĉiu popoloj ŝatas opinii sin kiel la plejamatan de Dio; vi scias ke al la popoloj plaĉas pensi ke Dio estas kun ili, kaj nenio en la historio okazigis tiom da katastrofoj kiel kiam popolo opinias havi Dion kun si. Kiam popolo diras: “Dio estas kun ni” tiu ĉi aserto alportas morton kaj detruon al aliaj popoloj. “Ili ne havas Dion, do, kion ili postulas?”

Do, kia estas la novaĵo de tiuj ĉi magoj? La novaĵo de tiuj ĉi magoj estas ke, dum tuta Jeruzalemo ektimas pro tio kion ĝi estas perdinta per la alveno de la Reĝo de la judoj, kaj Reĝo Herodo jam planas lin murdi, tiuj ĉi magoj troviĝas en la domo de Jesuo kaj ili alportas al li tri donacojn kiuj havas grandan teologian valoron. Kio estas tiuj ĉi donacoj? Temas pri oro, incenso kaj mirho. Ili elmontras grandan universalan malfermitecon de Jesuo kiun la Evangeliisto jam antaŭanoncas en la scenejo de Lia naskiĝo.

Kial oro? Oro estis la donaco kiun oni faris al Reĝo. Nu, la honoro de Izraelo esti la regno de la Sinjoro, esti regno supera al la aliaj nun trasdoniĝas al la tuta homaro.

Ne plu ekzistas izraela regno por reakiri, sed ekzistas la regno de Dio por inaŭguri. Ne plu ekzistas bariloj kaj landlimoj sed ekzistas la regno de Dio, tio signifas ke la amo de la Sinjoro sin turnas al ĉiu homo kaj, kiel diras Sankta Petro, ne ekzistas homo kiu povu sin senti ekskludita de tiu ĉi Dio, kia ajn estu lia socia stato. Do, la oro kiu simbolas la reĝecon, signifas ke inaŭguriĝas la regno de Dio.

Kaj ankaŭ la incenso: la incenso estis la specifa elemento por la sacerdota servo en la Templo kaj Izraelo havis la honoron esti konsiderata kiel pastra popolo. Pastra signifas havi rektan kontakton kun la Sinjoro. Nu, ankaŭ la honoro esti pastra popolo ne plu limiĝas al Izraelo sed ĝi etendiĝas al la tuta homaro kies proprarolantoj estas la magoj kaj la paganoj.

Finfine la mirho. Kial la mirho? En la Malnova Testamento la mirho estas la ŝmiraĵo de la edzino, de la geedzoj. Izraelo, kiel popolo, opiniis esti la edzino

de Dio. Nu, por Sankta Mateo ankaŭ la paganoj havos tiun ĉi rolon. Ili estos konsiderataj la geedza popolo.

La tri karakterizoj de Izraelo, havi Dion kiel reĝo, esti la pastra popolo kaj edzino de Dio estos plilargigitaj ankaŭ al la paganoj, do la regno de Dio inaŭguriĝas.

Poste, kiel ni jam scias la situacio abrupte ruiniĝas: alvenas la dispozicio de Herodo murdi la infanojn; Sankta Jozefo prenas Marian kaj la filon kaj ili forfuĝas al Egiptujo. Do Jesuo ekde sia infanaĝo jam spertis kion signifas esti fremdulo kaj serĉi loĝeblecon en amika lando. Oni devas danki la egiptanojn. Ili estis mirindaj. Bonŝance ĉe la egiptaj landlimoj ne troviĝis niaj tre katolikaj regantoj, ĉar imagu al vi: temas pri netipa paro, ĉar ili ne geedziĝis laŭregule; la bebo ne estas filo de la kunulo de la virino; ili ne havas vivrimedojn. Ĉeestis ĉiuj motivadoj por ilia forpuŝado.

Bonŝance la egiptanoj paganoj kaj fremduloj esti multe pli homecaj ol niaj katolikegaj kaj tre piaj regantoj kaj ilin akceptis. Kaj tiu surprizo pro la akcepto de la fremduloj aperas tra la paĝoj de la Nova Testamento. Vi ja scias ke, kiam Sankta Paŭlo ŝiprompis kaj albordiĝis al insulo Malto li miris, kiel diras li mem, pri la malofta homeco de tiuj barbaroj. Do oni miras pri la fakto ke eĉ la barbaroj povas kapabli akcepti iun.

Nun ni daŭrigas priparoli la instruadon de Jesuo, Jesuo alportis tiun ĉi grandan universalan malfermitecon, riskante ĉiufoje sian vivon. Kiam popolo enradikigis en si mem la ideon pri religia supereco, kiam popolo opinias esti supera al aliaj popoloj tiam mesaĝo pri universala amo, aŭdaci diri ke Dio ne nur amas sed foje li eĉ preferas la paganojn, tio estas neeltenebla afero. Nu, Jesuo riskis sian vivon kiam li provis anonci tiun ĉi universalan mesaĝon. Kie li povis ĝin anonci? Ĉu en iu fojrejo kun la popolamaso? Sed oni ne povas scii, eble ili estas malpiuloj aŭ ĉeestas pekuloj, ili povas lin rifuzi. Kien oni povas iri por anonci tion kio estas la volo de Dio? Kia plej bona loko estas ol kultejo, sinagogo, la loko kie la piuloj kunvenas? Nu, tiuj ĉi lokoj estas la plej danĝeraj por Jesuo, ni jam tion scias, Jesuo kiu neniam riskos danĝeron kun la fremduloj, kiuj eĉ estos tiuj kiuj lin komprenos kaj akceptos kiel la veran savanton de la mondo, kiel faros la samarianoj, kie Jesuo riskos perdi sian vivon? En la sinagogo.

Pripensu kiam li iras al Nazareto. Li eniras la sinagogon - preskaŭ ŝajnas ke ni vidas la scenon- jam Jesuo pasumis predikante, kaj disfamiĝis la onidiro ke eble estas vere li la atendita Mesio.

Imagu al vi kia estas la atendo kiam finfine Jesuo revenas al Nazareto kaj, en sabato, li eniras la sinagogon. La tuta vilaĝo kunvenis en la sinagogo kaj, kiel oni kutimis agi kun gasto, oni permesas al li legi la liturgian tiutagan eron, sed Jesuo jam komencas per sia unua grava malobeo kiu ekkolerigas la



ĉeestantojn. Li ne legas la tiutagan liturgian eron sed li legas iun apartan eron. Ĉiukaze la elekto estis pozitiva.

Li serĉadas la 61an ĉapitron de profeto Jesaja, kie oni parolas pri la konsekro de la Mesio: “La spirito de la Sinjoro, la Eternulo, estas sur mi, ĉar la Eternulo min sanktoleis, por bonanonci al mizeruloj...”- kaj jam ŝajnas ke ni vidas la ĉeestantojn kiuj sin kubutbatas reciproke kaj diras: “Jen estas li. Estas li tiu kiun ni atendis”. Kaj Jesuo daŭrigas tiun anoncon faritan de profeto Jesaja pri la Mesio kaj li diras – “...por proklami favorjaron de la Eternulo kaj...” La versego daŭrigis. Jesaja daŭrigas per tiu kiu estis la plej atendita parto por la nazaretanoj kiu estis subigitaj de antaŭ pli ol 70 jaroj al la regado de la romianoj. Kaj kiu estis tiu ero kiun ili atendis? “Kaj venĝotagon de nia Dio”. Tiu ĉi eta popolo atendis la tagon kiam Dio estos elaĉetinta ĝin el la sklaveco, el la subpremo, kaj do imagu al vi kia atendo ekzistas kiam Jesuo komencas ĝuste legi la 61an ĉapitron, tiun pri la venĝo. Tamen Jesuo diras: “por anonci liberecon al kaptitoj kaj malŝloson al malliberigitaj, por proklami favorjaron de la Eternulo kaj...”. Li haltas legi. Li ne plu daŭrigas.

En la sinagogo estas streĉiteco. La Evangeliisto skribas ke: “La okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis”, ĉiuj ĉeestantoj tenis siajn okulojn sur li. Ne nur Jesuo haltas legi, sed eĉ li redonas la kunvolvitan libron al la subulo kaj sidiĝas. Kaj Jesuo nur parolis pri favorjaro de la Eternulo, sed ne pri venĝo de Dio al la paganoj. Kaj Jesuo komencas diri: “Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas en viaj oreloj”. Sed kia estas tiu skribo kaj tiu espero? Ĝi ne estas tiu pri la venĝo al la fremduloj, al la paganoj, al la romianoj, sed tiu pri universala amo de la Sinjoro.

La evangeliisto skribas: “ĉiuj”- ĉiuj homoj kiuj troviĝis en la sinagogo - kontraŭis lin, kaj miris pro la vortoj de graco, kiuj eliris el lia buŝo; kaj ili diris: “Ĉu ĉi tiu ne estas la filo de Jozefo?”. Ili ne pridubas la patrecon de Jozefo, sed “filo”, por la tiuepoka kulturo signifis iun kiu similas la patron en la sinteno, do, verŝajne ankaŭ Jozefo aprobis la atendojn de la nazaretanoj.

Bone, la situacio estas streĉa, temas pri situacio de granda streĉiĝo kaj Jesuo, kion li faras? Jesuo sendube estis provizita per ĉiuj virtoj en ilia maksimumo, sed, ho dibenita filo de Dio, li tute ne havis la singardemon. Anstataŭ klopodi trankviligi la animojn, anstataŭ provi klariĝi, kion faras Jesuo? Li iras tuŝi la dolorpunkton. Antaŭ ĉio li deklaras ke neniuj profeto estas akceptata en sia patrujo kaj poste ĉu li ne tuj iras refreŝigi du pecojn eltiritajn de la Malnova Testamento kiujn la hebreoj tenis bone fermitajn kaj kiuj estis preskaŭ polvoplenaj ĉar ili estis tiom malbone digesteblaj ke eĉ la hebreoj ne eltenis ilian legadon! Nu, Jesuo en tiu etoso en kiu li priparolas universalan amon kaj havas tutan aŭskultantaron el piaj nazaretanoj, kaj ĉiuj estas kontraŭ li, kion do faras Jesuo? Li revivigas ĝuste tiujn ĉi du pecojn. Ve al li kiu tion faris!

Kaj kiuj estas tiuj du epizodoj? Jesuo ilin rememoras kaj diras: “Rememoru”-tio estis jam transrakontita dum jarcentoj- “kiam estis ŝlosita la ĉielo tri jarojn kaj ses monatojn, kiam okazis granda malsato sur la tuta lando, ĉar mankis pluvo. Nu, al kiu Dio sendis la profeton Elijan por satigi iun? Ĉu Li sendis lin al iu ĉi tie en Izraelo, aŭ ĉi tie en Nazareto? – Ne Li sendis lin al Carfat en la lando Cidon, la nuna Libano, al virino vidvino”. Dio ne havas preferojn inter la homoj. Kiam estas bezonate, la Sinjoro helpas la povrulojn, sen atenti sen sin lasi haltigi ĉe la landlimoj. Kaj poste, Jesuo daŭrigas kiel se la ĉeestantoj ne estus komprenintaj lin: “Estis multaj lepruloj - lepro estis terura plago - la ununura homo kiu estis resanigita pere de profeto Eliŝa kiu estas? Li estas Naaman la Siriano”- Nome iu malamiko de Izraelo. La amo de Dio ne sin lasas kondiĉi de landlimoj nek de popolaj ideologioj.

“Kaj ĉiuj en la sinagogo pleniĝis de kolero, aŭdante tion”- kaj jen la konkludo: “Leviĝinte, ili elĵetis lin ekster la urbon, kaj kondukis lin ĝis la krutaĵo de la monteto, sur kiu ilia urbo estis konstruita, por ĵeti lin malsupren”. Kiam Jesuo audacis preparoli universalan amon, pri Sinjoro kiu ne faras tiujn distingojn inter hebreoj kaj paganoj, inter malamikoj kaj amikoj, sed li estas Sinjoro kiu amas ĉiujn homojn, li estas Sinjoro por kiu ankaŭ la filiŝtoj apartenas al sia popolo, ankaŭ la egiptanoj apartenas al sia popolo, tio estis afero tiom netolerebla, tiom neeltenebla, ke la ĉeestantoj en la nazareta sinagogo strebis murdi Jesuon.

Sed Jesuo ne cedas en sia instruado kaj kiam, ĉiam reveninte al la Evangelio laŭ Sankta Mateo, en la 25a ĉapitro, li indikas kiuj estas la kondiĉoj por havi plenan da vivo, li ne listigas iun ajn religian sintenon aŭ la fidon sed li listigas ĉiujn sintenojn rilatantajn la amon. Kiam la Sinjoro sin trovos fronte al la homoj li ne pridemandos ilin ĉu ili kredis aŭ ne, sed li pridemandos ilin ĉu ili amis aŭ ĉu ili ne amis. Li ne pridemandos ilin ĉu ili eniris la templon sed li pridemandos ĉu ili malfermis sian domon al la bezonuloj. Kaj Jesuo listigante la agojn kiuj indikas plenan je vivo sin identigas kun fremdulo: “Mi estis fremda, kaj vi gastigis min”.

Vere mi imagas al mi kaj demandas al mi: “kion ni respondos kiam li faros al ni tiun ĉi demandon? Ĉu ni respondos, Vi scias la itala leĝo tion ne permesis? Eĉ estis la itala ministro pri internaj aferoj tiom sentema pri tiaj demandoj: vere ni ne povis akcepti la fremdulojn!

Jesuo diras: “Mi estis fremda, kaj vi gastigis min”. Atentu tion kion li diros poste al tiuj kiuj lin ne akceptis – dum al la unuaj li diros: “Venu, vi benataj de mia Patro”, eĉ se ili neniam aŭdis preparoli Dion kaj neniam Lin konis. Fakte ili diras:”Kiam ni vidis vin en malliberejo aŭ fremda? Kiam ajn tio okazis?” Jesuo diras:” Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom

vi faris al mi”. Sed se Jesuo diras: “Venu, vi benataj de mia Patro” li diras terurigajn vortojn al tiuj al kiuj li diras: “Mi estis fremda kaj vi ne gastigis min”. Ne gastigi la fremdulon signifas morton ĉar se fremdulo frapas al nia hejmpordo certe li tion ne faras ĉar al li plaĉas vojaĝi. Li tion faras ĉar li venas el etoso vivmanka kaj li serĉas akcepton.

Tiam Jesuo al tiu kiu malakceptas Lin kiel fremdulon: “Mi estis fremda, kaj vi ne gastigis min” Li diros la timigajn vortojn: “For de mi, vi malbenitaj”. Sed dum al aliuloj Jesuo diras: “Venu, vi benataj de mia Patro”, ĉar Dio estas amo kaj benas, al tiuj ĉi lastaj Li diras: “For de mi, vi malbenitaj”, Li ne diras: “For de mi, vi malbenitaj de mia Patro”, ĉar la Patro ne malbenas. Estas ja la homoj kiuj sin malbenis. Kiu rifuzas doni vivon al aliuloj, li ĝin, jes ja, forprenas de la aliulo, sed ĝin forprenas eĉ de si mem.

Nun, ni estas farantaj mallongan trarigardon tra ĉiuj Evangelioj, en ĉiuj la fremdulo estas ĉiam tiu kiu riĉigas la vivon de kiu lin akceptas. Oni timas la fremdulon ĉar oni opinias ke li povas forpreni ion de ni. Vere estas la akcepto de la fremdulo kiu nin riĉigas. Vero kiu elstariĝas en la Evangelioj estas ke ni fariĝas kiel la homoj kiujn ni akceptas. Ĉiu el la akceptitaj homoj estas kio mankis al ni por realigi nin mem. Do ĉiu homo kiun ni renkontas kaj akceptas en nia vivo estas kvazaŭ donaco de la Sinjoro por plibeligi nian vivon. Kaj la fremduloj, en la Evangelio, ili ĉiuj estas pozitivaj roluloj, estos ili kiuj komprenos Jesuon, estos ili, kiel Simono la cirenano, kiuj portos la krucon de Jesuo, estos samarianino kiu, la unua, komprenos la kvaliton de la Jesua mesaĝo, estos la samarianoj, la hereza, la nekredanta popolo tiuj kiuj malkovros en Jesuo la savanton de la mondo kaj ni finas per bildo kiun mi opinias tre interesa kaj tre aktuala, kiun ni trovas en la Evangelioj. La surskribaĵo de la kruco.

Vi scias ke la surskribaĵo de la kruco de Jesuo estas skribita en tri lingvoj: ĝi estas skribita en la hebrea, en la latina kaj en la greka lingvo. Kial? La hebrea estis la lingvo parolata de la popolo, la latina estis la lingvo parolata de la regantoj, de la romianoj, la greka lingvo estis la komerca lingvo, kiel la nuna angla lingvo. Kial en la surtitolo de la kruco de Jesuo estas skribite: “Jesuo, reĝo de la judoj” per tiuj ĉi tri lingvoj? Kial? Ĉar en la templo de Jeruzalemo ĉiuj povis eniri, ĝis iu grado.

Estis barilo kie, je malproksimeco de 15 metroj, estis slabo kie estis skribite ke kiu ajn fremdulo audaciis preterpasi tiun ĉi ĉirkaŭbarilon respondecis pri sia murdo mem.

Do, se fremdulo aŭ pagano ĝin preterpasis kaj oni lin kaptis, li tuj estis mortigita. Do temis pri Dio kiu estis disigita de la aliaj homoj. Nur la judoj povis alproksimiĝi al Li. Nu, tiu ĉi slabo kiu utilis por malhelpi la eniron de la fremduloj, de la paganoj ĝis la Sinjoro, pere de Sankta Johano la Evangeliiisto,

trasformiĝas en allogaĵon. Ne nur ne plu estas malpermesate al la fremduloj alproksimiĝi al la Sinjoro, sed la alproksimiĝo al la Sinjoro fariĝas vivfonto.

Nu, tiun ĉi gravan skribaĵon, tiun ĉi diraĵon, tiun ĉi malpermeson Sankta Paŭlo uzos en unu el siaj leteroj dirante ke Jesuo finfine venis por faligi la muron de la disigo.

Pere de Jesuo oni batfaligis tiun ĉi muron kiu disigis la homojn unu disde la alia, la purulojn disde la malpuruloj, la hebreojn disde la fremduloj, la paganojn disde la ceteraj homoj. Skribas Sankta Paŭlo, Jesuo Kristo rompis la intermuron de la disigo.

Tiam, la bondeziro kiun ni sendas al ni reciproke estas eĉ la invito suprenfaldi la manikojn kaj labori por ne plu starigi murojn kiuj nin disdividu de la aliuloj, sed rompi ilin. Ne temas tiom pri faligo de muroj faritaj per brikoj, tio estas eĉ facila afero, sed ekzistas muroj faritaj el antaŭjuĝoj, faritaj el tradicioj, muroj faritaj el religiaj opinioj, kiuj estas tiom enradikiĝintaj en ni mem, ke ili estas malfacile elradikigitaj. Sed tiu estas la tasko kiu nin atendas por ke tiu novaĵo alportita de Jesuo, kiu ekburĝonis en la tekstoj kiujn ni konsideris, povu ekflori en nia medio.

Mi dankas Vin.